

Vinko Ošlak

## Kial mi forlasas

la eklezion de Romo

Post 33 jaroj, se mi aldonas la jarojn de mia infanaĝa kredo post 45 jaroj de romkatolika aparteno mi forlasas la rom-katolikan eklezion – kaj post 17 jaroj mi foriras de mia laborposteno enkadre de Katolika agado de la karintia diocezo en Aŭstrio. Mi foriras nek en ĉagreno nek pro iu aflikto, ne pro disreviĝo kaj ne el manko de plenumiĝo, ne pro maljustaĵo kaj ne pro ofendiĝo. Se temus pri io ajn el tiu ĉi listo, mi ne havus pravigon kaj argumenton, adiaŭi per tiom ampleksa klarigletero. Tiun ĉi klarigon mi kompilas pro tio ke la kialoj de mia foriro estas multe pli profundaj kaj trafas ĉiun kredantan kaj en sia kredo serĉantan homon, tiel ankaŭ ĉiujn miajn gekolegojn kaj superulojn. Mi ŝuldas mian klarigon al ĉiuj, kun kiuj mi dum tiu tempo profesie kunlaboris aŭ havis ĉe ili profesion respondecon, ja mia kazo ligiĝas kun la loko en la Sankta skribo, kie oni estas vokita atesti, ĉu en konvena ĉu en nekonvena tempo kaj cirkonstanco kaj montri la kialojn de sia espero: „*Sed la Sinjoron Kriston sanktigu en viaj koroj; ĉiam pretaj doni defendan respondon al ĉiu, kiu postulas de vi klarigon pri la espero, kiu estas en vi, sed kun humileco kaj timo*” (1Pt 3, 15) aŭ: „*Tio fariĝos por vi atesto. Decidu tiel en viaj koroj, ne prizorgi antaŭe pri pleda respondo*” (Lk 21, 13-14). Estas vere, neniu demandis min pri tio, kion mi ĉi tie priskribas, sed mi supozas ke tion faros miaj superuloj, kun kiuj mi laŭ la profesia devo kunlaboris, kaj al ili mi same ŝuldas honestan respondon. Per mia decido mi adiaŭas ankaŭ de ili.

Komparante ĉiujn deĵorojn, kiujn mi en mia vivo plenumis, tiu ĉi ene de Katolika agado enkadre de la karintia diocezo ne estis unu el malbonaj. Miaj gekolegoj kondukis al mi pliparte ĝentile kaj kooperacie, ili en la plimulto de okazoj estis senriproĉaj en rilato al mi – neniu plendon mi povas levi kontraŭ miaj superuloj; la labordonanto, do la karintia diocezo, estis por mi bona kaj komprenema labordonanto. De ĉiuj mi do adiaŭas en dankemo kaj kun multaj tre belaj rememoroj. En tiu ĉi institucio mi multon lernis, sen ĝi mi multajn aferojn, speciale tiujn, kiuj koncernas mian kredon, neniam ekkonus, do ankaŭ tiujn ne, kiuj decide helpis al mia kredo kogno, pro kiu la konsekvencemo en la kredo postulas de mi foriron.

Mi foriras – kaj mi devas foriri, eĉ se ĉiuj argumentoj tion malpermesus – ĉar la eklezio, en kiu mi ĝis nun laboris kaj al ĝi apartenis, ne estas tiu, kiu kondukus siajn kredantojn al la savo, kaj tio estas por mi la ĉefa kialo aparteni aŭ ne aparteni, ja post ĉio, kion diris al mi la Vorto de Dio kaj kion montris al mi la observado de la eklezia agado, okazado kaj vortoj kaj agoj de ĝiaj superuloj, ne estas la eklezio de Jesuo Kristo. La katolika eklezio de Romo estas la kredo kaj institucio de la romia imperiestro kaj tio ĝi restis ankaŭ post tio, kiam la imperio jam ne plu ekzistis kaj ĝi tio restos, kiam la imperio denove aperos, kiel jam anonciĝas kaj desegniĝas antaŭ niaj okuloj, eĉ se la nomoj de antikvaj aferoj estas aliformaj kaj unuavide kelkaj homoj tiun ligan ne povas trovi. Mi foriras ĉar tiu ĉi institucio instruas kaj predikas falsifitan evangelion kaj tiel miskondukas milionojn kaj centojn da milionoj de siaj adeptoj, ke ili tiel ĉiam pli distanciĝas de Jesuo Kristo, tra kiu sole kondukas la vojo de la saviĝo, anstataŭ postsekvi Lin, kiel li mem postulis. En tiu ĉi institucio mi samtempe registras pli kaj pli da plenumiĝoj de malnovtestamentaj kaj novtestamentaj profetaĵoj, montrantaj, ke ĝuste tiu ĉi eklezio plej forte defalanta inter ĉiuj defalantaj laŭnome kristanaj eklezioj preparos la religian fonon por la apero de Antikristo kaj lia lukto kontraŭ la sanktaj el la aŭtenta eklezio de Kristo, kiu suferos persekuton kiel neniam antaŭe. La falsa eklezio, kiun mi en lasta momento, se temas pri mia saviĝa destino, forlasas, provas per siaj demonecaj instruoj, pri kiuj parolas apostolo Paŭlo en sia letero al Timoteo (1Tim 4, 1) forpuŝi nian Savanton kaj solan Peranton inter Dio kaj la homo al la dua aŭ eĉ iu malpli alta pozicio kaj sur lian lokon

poziciigi idolojn en elpensita ligo kun grandaj personecoj de la kredo kiel la vera patrino de Jesuo Mariao aŭ kun kelkaj aliaj, kiujn tiu ĉi eklezio proklamis „sanktuloj kaj pripetantoj”, pri kio la Sankta skribo diras nenion.

Unu el plej pereigaj malbonagoj de tiu ĉi falsa eklezio tamen estas la negado de unu foje por ĉiam atingita saviga potenco en suferado kaj morto sur la kruco de Jesuo por nia savo kaj de el tio fontanta graco, pere de kiu estos savita ĉiu, kiu lin kredos kaj vokos lian nomon. Tiu ĉi negado en terura nescio ĉe la tentitoj aŭ en malico de tentantoj plej draste esprimiĝas en ilia kompreno de „dia servo”, kie ili dum ĉiu „meso”, sub ilia erara koncepto eĉ nomata „sankta”, ĉiam denove krucumas Jesuon Kriston, kvazaŭ dum Lia efektiva krucumado Lia verko ne estus plenumita – jes, nur „sensange”, kiel ili tion proklamas, sed tamen krucumante kaj tiel negante la unuan kaj veran krucumadon kaj ĝian savan sufiĉecon. Same kiel ili havas sian „mesoferon” por la centro de kristana vivo, tiel tiu ĉi terura malama rito en vero estas la centro de vere satana kontraŭstaro al la aŭtenta ununura ofero por ĉiam de nia Sinjoro – temas pri vera nigra Satana meso en plena signifo de tiu ĉi nocio. Eĉ la negado de la Dia kreado de la mondo kaj de la homo ne povas esti pli malbona kontraŭstarado al ĉio vere Dia ol la negado de la unufoje por ĉiam (Rom 6, 10; Heb 7, 27) sufiĉa morto de Dia filo, per kiu estis deaĉetita la homa ŝuldo, unufoje por ĉiam kaj por ĉiu, kiu tion en sia kredo akceptas kaj tiel atingas savon.

Por ke la falsifado de la evangelio povus efike plenumi sian perversitan mision de miskondukado de la homamasoj for de Kristo al la idoloj, oni bezonas ankaŭ komplete propravolan kaj difektitan rigardon sur la Dian vorton, oni bezonas klarigan relativismon, oni bezonas rezervigon de aŭtoritataj klarigoj por la t.n. „eklezia instruistaro”, kio faras jam la duan frontan atakon kontraŭ la Dia ordo, laŭ kiu tiu ĉi verko estas rezervita por Sankta Spirito kaj ne por unuopa homo aŭ ia „ordinita” homgrupo. La subskribo de Sankta Spirito sub la gvidado de tiu ĉi eklezio estas falsifita. Ni farus malbonegan sakrilegion, nepardoneblan pekon kontraŭ Sankta Spirito, se ni asertus ke tiel malbonaj historiaj kaj kredaj eraroj, kiajn atestas la milkvincentjara historio de tiu ĉi eklezio, estus la verko kaj inspiro de la tria Dia persono.

La eklezio de Romo, kiu sian striktan hierarkian organizecon argumentas per la bezono de unueco, estas laŭ diversaj manieroj disdividita kaj en konflikto en si mem (*„Kaj se regno estas dividita kontraŭ si, tiu regno stari ne povas”* (Mk 3, 24); *„Sed li, sciante iliajn pensojn, diris al ili: Ĉiu regno kontraŭ si dispartigita ruiniĝas, kaj domo kontraŭ domo dispartigita falas”* (Lk 11, 17).

La ekstera disdivideco, videbla unuavide, estas la disdivido je doktrineca, pastoralaj kaj praktika partoj – kaj ĉiuj tri partoj estas inter si profunde malakordaj. Tiel ekzemple la eklezio de Romo en sia doktrino agnoskas al Dia vorto almenaŭ principe, se ne la plej altan aŭtoritaton en sia instruado, almenaŭ la saman kiel al la t.n. „tradicio”. Sur la pastoralaj nivelo tamen la sacerdotoj de tiu ĉi sama eklezio la Sanktan skribon laŭplaĉe relativigas kaj interpretadas laŭ sia bezono, kio tiel kontraŭas al la doktrina pozicio de la Biblio. Sur la praktika nivelo, do nivelo de la ĉiutaga religia vivo la ordonoj kaj malpermesoj de la Biblio estas simple ignorataj aŭ la praktiko eĉ ĝuste kontraŭstaras la normojn, kiuj estas la normoj de Dio mem, la vera aŭtoro de sia Vorto. Tiel la lasta nivelo estas en polusa kontraŭo kun la unua kaj la dua. Sed tio ĉi ne estas nur la disdivido de la eklezio laŭ ĝiaj strukturaj kuniĝlinioj, tio samtempe estas religia tranĉo kaj bildo de ĉiu unuopa adepto de tia eklezio, speciale eĉ de ĝia religia „instruisto” kaj de ĝia „ofica sacerdoto” ek de la simpla kapelano ĝis la romia episkopo, kiun oni blasfeme nomas per la nocio, kiu en la Biblio estas rezervita por Dio mem: „Sankta patro”!

Tute komprenebla estas la demando: „Kaj por tiu ĉi ekkono vi bezonis tutajn 17 jarojn de via ofico tiel proksime de la katolika altaro, hierarkio kaj instruistaro, post kiam vi jam antaŭe dum tiomaj jaroj estis katolio laŭ propra elekto kaj sen iu ajn perforto?”

Mi esperas ke mi per mia decido, per kiu mi okaze de mia foriro en la aĝo de 59 jaroj kubĵetas pri mia ĉiutaga pano, ne nur de la pano por mi, sed por mia tuta familio, tamen montras sufiĉan aŭtentikecon, ke mi la decidon ne faris el iu ajn facilanimeco aŭ pro iu triviala kialo. Mi tre bone pripensis en mi la tutan aferon kaj mi tro longe ŝancelis kaj serĉis iel ajn eblan kompromisan solvon. Tiel mia unua decido estis, jam preskaŭ antaŭ du jaroj, ĝis mia emeritiĝo insisti en la eklezio, kiun mi cetere prenas por falsa, sed ke mi agu en ĝi tiel, ke tio estu kongrua kun mia kredo. Dio tion ne akceptis kaj sendis al mi maltrankvilon en mia konscienco, kiu ne lasis min en paco kaj puŝis min al pura kaj honesta findecido. Nuntempe mi ne povas fari alimaniere, la sola tempoprolongo, kiun mi al mi permesis, estas, ke mi finis la laborjaron kaj ne lasas post mi nefinitajn kaj meze de proceso interrompitajn programojn kaj projektojn, per kio mi damaĝus mian labordonanton, kaj tio ne estus en kongruo kun mia konvertiĝo.

Ĉio-ĉi tamen ne komenciĝis nur antaŭ pli ol unu jaro, sed jam longan tempon antaŭe. Ankaŭ ĉi tie mi volas tion klarigi, ja tiu ĉi letero ne estas nur adiaŭo, sed ankaŭ invito – invito en tiu senco, ke la adiaŭo en plej bona kazo tute ne okazu, se nome ni ĉiuj kune ekmarŝu en la direkto al nia Sinjoro, kiel Li nin invitas kaj nur malmultaj Lin vere postsekvas. Ne nur miajn senperajn gekolegojn kaj superulojn, ankaŭ ĉiujn gvidajn funkciulojn de la rom-katolika eklezio en la karintia diocezo mi invitas, ke ili profunde pripensu sian kredon, ke ili *konvertiĝu kaj kredu la evangelion* (Mk 1, 15); kaj tiuj inter la estroj, kiuj al sia eklezio promesis vivi virgece, sed tamen vivas, kaŝe aŭ foje eĉ publike videble, en komuneco kun virino, ke ili ĉesu vivi en la peko kaj geedziĝu, estu kiel diras la apostolo koncerne episkopojn kaj estrojn, „*edzo de unu edzino*” (1Tim 3, 2).

La homoj nuntempe emas kompreni ŝanĝojn en onia kredo kaj pensado, eĉ speciale, se temas pri adepteco diversspeca, unue eklezia, poste ankaŭ politika, kiel signon de malbona karaktero. Mi ne havas planon defendi aŭ eĉ devi defendi sian karakteron. Mi ne ĵuras je mia karaktero kaj ĝia eventuala firmeco, ja mi mian savon ne esperas trovi en tiu ĉi tiom malfirma elemento de la homa animo, sed en nia Sinjoro, kiu ankaŭ por mi sur la kruco deaĉetis pli ol povas esti kaj doni eĉ tiom bela kaj firma karaktero. Tiel speciale la grandaj ŝtatecaj eklezioj, inter kiuj speciale distingiĝas la rom-katolika, vivas grandparte ĝuste de la timo de milionoj da iliaj adeptoj, ke ili povus montri sian malfirman karakteron, se ili agus laŭ sia konscienco kaj ne plu laŭ la tradicio, en kiun ili estis naskiĝintaj kaj en kiu ili estis edukitaj. Mi aperte agnoskas, ke mi preferas esti senkarakterata antaŭ la homoj ol perdita antaŭ Dio. Se mi venos al iu nova ekkono kaj ĝin garantios tiom (por mi) nevenkebla aŭtoritato kiel la Dia vorto mem, tiam mi daŭre ĵetos mian „karakteron” de la ferdeko kaj prefere alrigardos la nordpolusan stelon de Dia gvidado ol la efemerajn perditajn bolidojn de nure home produktitaj piroteknikaĵoj. Iam, antaŭ preskaŭ 30 jaroj, mia ĝisdate fidela katolika amiko min antaŭ la granda publiko forte laŭdis, ke kiam mi vidas la veron, mi lasas resti surloke ĉion kaj postsekvas la veron, senrigarde al la kostoj. Nuntempe, kiam mi procedas simile, nur ke nun mi postsekvas la *totalan* veron kaj ne nur la partan, kiel tiam, kiam mi lasis post mi revojn de marksisma utopio (kvankam mi neniam estis ano de iu komunista partio) kaj alprenis kristanan kredon en ĝia katolika falseco (kion mi tiam ne sciis kaj ne vidis), li nun kompreneble ne laŭdas min (kio en si mem al mi plaĉas, min konfirmante), ja li opinias, ke mi nun la veron forlasas, sen ke li povus mencii unu solan kredan argumenton, do citaĵon el la Sankta skribo – kiam mi tiel forlasas la roman miskomprenon kaj orientigas mian stirilon laŭ la Dia vorto kaj nenio alia. Tiam antaŭ 30 jaroj li feliĉigis min por momento, nuntempe li per sia kontraŭstaro konfirmas min por la eterno. La afero, nome, estas sekva: Kiam oni kognas poparte, nur parte forlasante falsajn tradiciojn, multaj aplaŭdas kaj multaj montras kunpremitajn pugnojn. Sed kiam oni kognas en pleno – kvankam daŭre en la pala spegulo de apostolo Paŭlo! – la tuta mondo krom malmultaj gefratoj en la kredo montras kunpremitajn pugnojn de kolerego kaj troviĝas neniuj, kiu aplaŭdus: la plimulto ne aplaŭdas, ĉar tiuj en onia

lasta elekto kontraŭstaras; tiuj kelkaj, kiuj same kredas, ĉar ili scias, kiel danĝere estas flati al la homo sur la tero, eĉ se la motivo mem estus ĝusta...

Mia kompreno de ĉio katolika, kiun mi post dek jaroj de juneca ateismo kaj marksisma socialisma humanismo alprenis, iasence ripetis mian antaŭan sintenon. Ĉar mi al la tuta afero aljuĝis principan kaj nerenverseblan valoron kaj validon, mi laŭvice pretervidis ĉion, kio jam unuavide estis pridemandinda kaj en malkongruo kun la spirito de la evangelio. Tiam mi ne konis jam nuntempe tiel fifamajn seksskandalojn de multaj katolikaj sacerdotoj de ĉiuj rangoj kaj pozicioj, kiel mi tion konas nuntempe, tamen jam tiam multaj aferoj tiklis mian rigardon. Tiel min ĝenis artificeco kaj teatreco de la liturgio – kvankam mi ne komprenis, ke la liturgio, eĉ se ĝi estus malpli teatreca kaj artificeca, estas el si mem io al Jesuo kaj Lia Spirito komplete fremda kaj por nia savo senbezona, eĉ malhelpa. Min ĝenis videbla kaj evidenta neglekto de la en katolika katekismo tute pretervidita dua ordono de Mosea dekalogo, kiu malpermesas fari bildojn de ĉio spirita en la ĉielo kaj sur la tero. Sed mi pensis – kia miskompreno tamen! – ke tio estas nure stileca eraro en la eklezio, sed ne la esenca parto de ĝia falsifeco en komparo kun la spirito el la Dia vorto. Ankaŭ la disciplino de la celibato de la tuta komenco ŝajnis al mi fremda al evangelia kaj apostola tradicio, tamen mi en mia unua katolika fervoro opiniis, ke temas pri io senbezona, sed ankaŭ neesenca por tio, kion la eklezio en sia trezorejo tamen transportas el jarcento en jarcenton.

Koste je mia honoro kaj renomo mi devas agnoski, ke mi estis dum tiu tuta tempo, preskaŭ ĝis la lasta tempo, fascinata ne tiom de la ekstera, arkitektura, pentroarta, sed antaŭ ĉio de la intelekta kaj poezia grandeco de la rom-katolika eklezio. Ĉi tie mi trovis la plej grandajn filozofiajn nomojn, ĉi tie mi povis elekti ankaŭ la plej grandajn nomojn de la tutmonda poezio, prozo kaj dramo, ĉi tie hejmis grandaj pensuloj, kiujn mi admiris kaj provis al ili, ankaŭ en imitado, alproksimiĝi. Tio estis mia vera falilo. La domo, mi konvinkigis min, en kiu loĝas tiel imponaj nomoj de la tutmonda kulturo, saĝo kaj arto, povas esti nur aŭtenta domo, eĉ se en ĝi troviĝas tiomaj malallogaj ejoj kaj aferoj.

Mi estis preta pardoni kaj forgesi malatendon de la kompleta Dekalogo, ja mi en tiu ĉi domo povis admiri tiom grandajn verkojn de la homa spirito. Kaj ĝis la lasta momento mi ne ekkonis ke mi nuntempe tiel staras hontigita antaŭ mia Dio kaj antaŭ la homoj, ke Dio je la fino de tiu ĉi ŝajne tiom grandan „homan spiriton” hontigos kaj ridindigos, kiel Li tion faras en certa mezuro kaj por averti la vivantojn jam nun paralele, dum la paso de la tempo, kiu ankoraŭ mankas ĝis sia plenumiĝo. Preskaŭ ĝis la lasta momento mi lasis min misgvidi ankaŭ de la fama parabolo de Boccaccio pri la konvertiĝinta judo en lia novelkolekto *Decamerone*, en kiu la religie serĉanta judo, kiam li pilgrimas inspekti Romon, ĝuste vidinte malpuraĵojn en la „eterna urbo” akiras por si la lastan konfirmon por baza ĝusteco de la roma religiinstruo kaj eklezio, ja la institucio, kiu spite al tiaj malpuraĵoj dum tioma tempo spite ekzistas, vere ne povas esti malĝusta. Same kiel Boccaccio ankaŭ mi ne sciis elkalkuli eĉ tion ke laŭ tia regulo estus mirinde konfirmitaj en sia ĝusteco preskaŭ ĉiuj homaj religioj kaj eĉ pli diversaj superstiĉoj el la komenco de la tempoj ĝis niaj tagoj, krom ekzemple kelkaj plej novaj, kiuj tamen estas nur novaj variaĵoj de la jam pli frue ekzistantaj. Finfine la kristana kredo ne estas la plej malnova inter tiuj, kiuj daŭre en la mondo ekzistas, sed ĝust kontraŭe, unu el plej novaj, tiel dirite ekster la konkurenco de tiuj, kiujn la renversita logiko de Boccaccio, eĉ se tiel sprite, povus agnoski. En tio ĉi troviĝas finfine preskaŭ la tuta *skandalon* de juda ortodokseco ĝis niaj tagoj. La raporto pri Jesuo estas por tiuj homoj simple tro proksime, ne jam vera historio, por ke ili ĝin preni por serioza; mitoj venas ĉiam el iu nekalkulita tempo – dum la rakonto pri Jesuo estas tempe difinita per la nomoj de du imperiestroj kaj iliaj prokuratoroj en Sirio kaj Palestino – kaj por la plimulto de farizee kaj saducee kredintaj judoj la raporto de Moseo jam delonge ne plu estis priskribita veraĵo, sed nur plu antaŭhistoria mito...

Antaŭ proksimume kvin jaroj en mi ĝisfine disfalis la iluzio pri katolikaj sacerdotoj kiel veraj reprezentantoj de nia Sinjoro sur la tero. Invitita prelegi pri „laikoj” ĉe la teologia fakultato en

Labako mi antaŭ la unua sidvico, en kiu sidis almenaŭ du episkopoj kaj aro da altaj sacerdotoj kaj profesoroj de la teologia fakultato en labaka diocezo en Slovenio mi refutis la dividon de la kristanoj je „laikoj” kaj „sacerdotaro”, samtempe mi montris evangelian senbazecon de sacerdota profesio per ironia frazo, kiu tekstis, laŭmemore, iel tiel: „La papo pravas en sia rifuzo ordini virinojn por fariĝi sacerdotoj: la eklezio vere ne havas rajton ilin ordini. Sed la papo sian penson ne diris ĝis la fino. La eklezio same ne havas rajton ordini virojn!” Se iu opinias ke mi travivis tumulton de protestoj kaj kontraŭstaroj, eraras. Defendante la eklezian doktrinon pri laikoj kaj ordinitaj sacerdotoj levis sin nek unu sola voĉo kaj la publiko pridonacis min per longa aplaŭdo!

Bedaŭrinde jam multe pli frue kunfalis en mi ankaŭ la morala konstruo, kiun la romkatolika eklezio tamen agnoskas kaj instruas. Estinte „kristano”, do romkatolika kristano nur el mi mem, el pure homaj ekkonoj kaj fortoj, io alia ne povis okazi. Ne temas pri tio ke mi estus malica kaj havus intencon al iu damaĝi, temas pri tio ke mi senhonte prnis aferojn, kiujn mi ne havis rajton preni. Ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu geedziĝinta homo scias, kiel rapide kaj facile oni povas kolekti tre firmajn argumentojn kontraŭ sia geedza partnero, kiuj en sintrompado permesas putran kompromison kun minimume du Moseaj ordonoj, koncerne al Dia postulo de pura vivo. Tiun ĉi malĝojan vojon mi baldaŭ post starigo de propra familio kaj post la naskiĝo de unuaj du infanoj ekpaŝis ankaŭ mi. Unue por kelkaj jaroj nur en la formo de deziro kaj pekokarakterata korespondado, en mia „matura” vivperiodo tamen, kvazaŭ en mi ĉio freneziĝus, ankaŭ age, kion mi nuntempe forte bedaŭras, eĉ aparte, ĉar tion, kion mi misfaris al mia familio, ne povas plu fari bona. Ĉio ĉi min tamen ne ĝenis en mia sento ke mi estis tute normala katolika kristano. Mi ne povas kaj mi ankaŭ ne volas ludi nescion, kvazaŭ mi tiam ne sciis, kio eĉ laŭ la katolika moralo kaj katekismo estas ĝuste kaj malĝuste. Nu, al ĉio-ĉi mi simple havis rilaton, kian la „eklezia instruistaro” havas rilate Dian vorton entute, ke oni ĝin, nome, ne traktu laŭvorte, ke oni ĝin rigardu el historia perspektivo kaj konkreta homa vivo kaj ĝiaj donitaĵoj, do relative. Ĝuste tio ĉi, kion la romkatolika eklezio entute faras rilate Biblion, tion mi faris rilate eklezian moralan ka katekisman instruon. Klare skribitajn regulojn mi prenis samlogike ne-laŭvorte kaj „historie”, vere relative, zorgante pri ĉiuj vivocirkonstancoj kaj donitaĵoj, ja ĉio-ĉi min en miaj okuloj senkulpigis kaj ne kondamnis. Mi diru klare unu aferon: tiu ĉi komparo eĉ en la kampo de nano-dimensio ne signifas, ke mi serĉas kulpon por miaj pekoj ĉe la eklezio, ankaŭ prenante ĝin por falsa. La kulpo absolute apartenas al mi, mi volas nur montri, kiamaniere tia konduto de la eklezio malrekte tre faciligas la trankviligadon de propra konscienco.

Sed la „pekoj de la karno” ne estas la plej malbonaj homaj pekoj, kvankam ĉiu unuopa el ili estas en si mem mortodona kaj la divido je „mortaj” kaj „etaĵ” pekoj estas eklezia invento, kiu ne havas bazon en la Dia vorto. Kion finfine faris malbone niaj pragepatroj? Ili manĝis fruktojn, Dio mia; ili ne ŝtelis kaj rabis, ili ne mortigis, ili neniun subpremis. Sed ĝis la tuta longa kaj ĉiam pli longa listo de teruraj pekoj en nia tempo tamen venigis la ago, kiun nia, en konscienco malklara tempo ne plu sentas peko. Nu, povus diri nia samtempulo, se ili nur trankvile manĝis iun frukton kaj tiel ribelis kontraŭ la nekomprenebla Dia „kaprico”, sed al neniuj cetera faris ion malbonan, tio ja ne povas esti iu vera peko... Tamen ankaŭ tio, kio okazis en Auschwitz, kiel de la ĉeno pendas de tiu frukto en paradizo, same kiel ĉiuj aliaj pekoj. Tie, kie el la buŝo de Adamo fluis la senkulpa suko de la maĉita frukto, dum la tuta posta historio fluis la elbuĉita homa sango! Kaj mi neniakaze ripetos teruran humanisman miskomprenon, dirante la sintagmon „senkulpa homa sango”, ja nur la sango de unu sola homo, nome Dio-homo Jesuo Kristo estis senkulpa (1Kr 8, 46).

Nekontenta kun tio, kion mi havis je dispono en la rom-katolika eklezio, mi simple mem provis iel komponi mian kredon, kian mi povus en tuto akcepti kaj laŭ kiu estus eble konsekvence vivi. Kaj al la komponaĵoj de tiu „komponita” kredo kiel kutimas diri katolika teologo profesoro Paul Zulehner, apartenis ankaŭ okultismo, ezotero, magio kaj aliaj superstiĉoj, kiujn la Biblio ĉiujn komentis „abomenaĵo por la Eternulo”. Mi travojaĝis ĉiujn

falsajn vojojn ek de jogao ĝis zeno, ek de pendolo ĝis taroto, ek de astrologio ĝis aŭgurado el kafo kaj karto. Mi konsultiĝis helpe de aŭguristinoj anstataŭ kun la Sinjoro; en la astroj mi serĉis tion, kio estas rezervita por Li, kiu la astrojn kreis. Kaj al tiuj venenigitaj trinkputoj mi kondukis ankaŭ aliajn kaj ilin tentis, glatigis iliajn padojn per siaj piedoj, kondukantaj al eterna pereco. La vojo de la certeco kaj seriozeco de Dia vorto en la direkto de ĝia relativigo nepre estas ankaŭ la vojo de la Sinjoro al la magiistoj de Baalo. Kaj en la societo de miaj bonkoraj kaj gajaj katolikaj kunkredantoj mi sentis neniun kontraŭstaron, nek kondukante ilin al tiuj falsaj vojoj kaj akompanante ilin, nek kiam mi mem ilin alpaŝis. Ni, nome, ne estis la ĝusta asembleo de nia Sinjoro, en kia tia vivo kaj konceptado en momento lanĉus fortan reagon de refuto kaj gefrata admono; ni estis nur iaspeca interesa komunumo je la nivelo de kanajla kamaradeco. Nur mia respondeco kaj pekemo estis, ke mi tiajn aferojn faris kaj tiel kredis – la respondeco de tiuj tamen, kiuj falsifis la evangelion, troviĝas en tio, ke en mia eklezio pro tio ne havis malfacilaĵojn, tute kontraŭe, mi ĝuis ene de ĝi grandan konfidon kaj simpatiojn, kiel mi kontraŭe, en la momento, kiam mi min alkroĉis al la Sinjoro kaj Lia vorto, tuj provokis decidan kaj momentan reziston kaj perdon de ĉia konfido. Mi povus voki serpentojn kaj malbonajn spiritojn kaj restus akceptita – sed en la momento, kiam mi vere komencis voki la nomon de la Sinjoro, kiu estas la sola, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj (Agoj 4, 12), ekbrulis ĉiuj lampoj de la eklezia alarmsistemo kaj ekhojlis ĉiuj sirenoj de ĝia defendkontrolado. Kompreneble tio neniam okazis rekte vizaĝ-vizaĝe, ja tio bezonus iom da karaktero, sed en vastaj ĉirkaŭvojoj, pere de la dua, tria aŭ centa mano. La samaj homoj, kiuj eĉ kontraŭstarante la klaran malpermeson fare de la episkopo, praktikas diversajn ezoterajn agojn kaj apude eĉ laŭte proklamas ke ili ne akceptos kontrolon de sia episkopo, nun kiel ekleziaj baŝibazukoj estas sendataj ĉasi tiujn, kiuj dume sin alkroĉis al Dia vorto kaj nuligis sian servadon al demonoj kaj sian tutan vivon disponigis al Jesuo.

Mi bone konas ĉiujn-ĉi defendomekanismojn de la rom-katolika eklezio ankoraŭ el la iama ĉasado, kiun kontraŭ mi kaj miaj demokratie pensintaj amikoj aranĝis la komunisma reĝimo en la iama Jugoslavio. En la mekaniko mem ne troviĝas ia esenca diferenco, ja en ambaŭ kazoj temas pri religio kaj eklezio de tiu ĉi mondo. La diferenco troviĝis nur en tio, ke la konfrontiĝo kun la komunismo, kiu ne havas tradicion da 1500 jaroj kun ĉiuj spertoj en rafinita ĉasado, persekutado kaj ekzilado, estis pli rekta, malpli perversa, malpli maskita. La iama slovena „papo” pri jurisprudenco dum telefona interparolo, kiam mi plendis ĉe li – li redaktis intelektulan duonmonatan gazeton en Labako (Ljubljana) „Naŝi razgledi” (Niaj horizontoj), kie mi publicis artikolon kun pledo kontraŭ la mortpuno (nun mi tion ne plu farus) kaj poste aperis akra atako de la reĝimproksima komunista funkciulo, sen ke mi havu eblecon respondi, kvankam la leĝo al mi tion garantiis – simplanime kaj rekte diris al mi: „Forgesu la leĝon pri la publikiloj!” Nun la sama persono instrucas slovenan publikon pri kio estas vera jura ŝtato... Tiuj, kiuj min nuntempe – preskaŭ ekskluzive el sacerdotaj rondoj – denuncas ĉe la eklezia aŭtoritato kiel „fundamentaliston” (Patro, pardonu ilin, ja ili ne konas la veran signifon de la vorto!) aŭ eĉ kiel homon, kiu „instruas novan kredon” (la kredo, kiu siajn lastajn du dogmojn akiris nur en la 19-a kaj 20-a jarcentoj, preparante jam la plej novan pri „Mariaj kiel kunsavanto de la mondo”, tiu ĉi estas vere la plej nova!) en sia historie akirita rafinita hipokriteco verŝajne neniam tiel rekte dirus al mi, kiel ekzemple: „Forgesu pri Moseaj ordonoj!” ja ili pro tio havas apartan katolikan eksegezon, per kiu ili povas al ĉiu kristano „pruvi”, ke tiu instruas falsan doktrinon, se li nur atentigas je nefalsifita teksto de la Biblio kaj prenas ĝin serioze, kiel ili tion praktikis kun la tuta abomeneco de martira proceduro super tiuj, kiujn ili dum la iamaj jarcentoj havis antaŭ si en katenoj kaj disponigitaj je graco kaj malgraco.

Al la demando, kiun ne eldiras al mi nur la aliaj, ĉu el la provo min en mia decido kompreni aŭ eĉ subteni, ĉu, prefere, por min akuzi kaj diskvalifiki, sed mi mem ĝin al mi starigas eĉ pli ofte, kial do mi bezonis tiom nekompreneble longan tempon por veni al ĝusta ekkono en la kredo kaj poste tion postsekvi, mi trovas nur partajn respondojn. Kion mi finfine en la lastaj

du jaroj, kiam tiu ĉi procezo en mi akceliĝis kaj la envidoj unu la alian preterkuris, ekkonis tiom ŝoka ke mi unutage devis al mi diri: Tiel ne plu!?

Ke la rom-katolika eklezio ne estas konsistita el legioj da anĝeloj, kiel dirus mia insiste katolika amiko Rebula, fariĝis al mi klare jam en la komenco, kiam mi en aĝo de 26 jaroj revenis en ĝin. Tial la argumento, ke mia konflikto kun tiu ĉi eklezio estas senfonda, ja ŝin konsistigas kekemaj homoj kaj do ne troviĝas vera kialo distanci sin de ĝi, estas nula. Ne nur la romkatolikan, ĉiujn aliajn, eĉ la aŭtente Jesuan eklezion konsistigaj nuraj pekantoj, en tiu ĉi punkto inter ili ne troviĝas esencaj diferencoj, kaj se tio estus la esenca afero, mi povus mian paŝon al mi ŝpari kaj trankvile atendi ĝis mia plena pensiiĝo en tiu ĉi institucio. Tamen, ĉu mia amiko-verkisto estus preta samtiel argumenti ankaŭ se temas pri faŝismo, kiun li mem travivis kiel mi ne travivis ĝin, pri nacionalsocialismo, kiun li travivis kiel viva atestanto, kiel mi nur de ĝiaj postaj daŭrigantoj, kaj se temas pri komunismo, kiun ni anbaŭ travivis kaj suferis: ĉu li ankaŭ ĉi tie povus diri: Kion do vi atendas, ankaŭ la faŝismo, naziismo kaj komunismo estas konsistataj de nure pekemaj homoj kaj ne de la anĝeloj...? Mi tre dubas, ke li regalus tiujn de la komenco kontraŭdiajn pensmanierojn kaj praktikojn tian rabaton, kian li donacas al la eklezio, kiu havas en sia historio similajn misuzojn de la Dia nomo kaj ĉe la unuaj du totalismoj eĉ mem en pliparta mezuro mem aprobante kunlaboris. Napoleono skandaliĝis el abomeno, kiam li post la okupacio de la papa ŝtato vidis, kiel judoj en Romo devis porti sur siaj brakumoj similajn davidecajn stelojn kiel en la regno de Hitler. Kie do la diferenco? Kaj en la periodo de rekonkisto (722-1492), kiam post la katolika okupacio de la iberia duoninsulo ĉiuj muslimoj kaj judoj, kiuj ne estis pretaj akcepti altruditan bapton, devis elmigri, sed multaj estis bruligitaj sur la ŝtiparoj per la agado de la hispana inkvizicio – kie do la diferenco disde la persekutado en ni diru komunismaj ŝtatoj? O jes, tamen estas la diferenco. En la plimulto de la komunismaj ŝtatoj oni kristanojn tamen ne elpelis aŭ sisteme kiel tuton torturis kaj mortigis, oni ilin nur opresis kaj traktis ilin kiel ŝtatanojn de la dua klaso kun malpli da civitanaj rajtoj. Ĉu oni povas la teruraĵojn de la rom-katolika eklezio – tiu ha havis la lastan kaj plej altan povon en ĉiuj katolikaj ŝtatoj de Eŭropo – klarigi per perversa sofismo, ke ankaŭ la katolioj ne estas legioj da anĝeloj, sed simplaj pekemaj homoj? Se iu en la plimulto de demokratiaj eŭropaj ŝtatoj provus tiamaniere klarigi la fenomenon de naziismo, li finus sian karieron antaŭ la tribunalo pro „restaŭrado de nazia aktivado”!

Jam longan tempon antaŭe, kiam mi ankoraŭ firme kredis je katolikismo kiel aŭtenta realigado de la eklezio de Jesuo Kristo, mi multfoje estis ŝokita pro tio, kun kia facileco (aparte) la sacerdotoj de tiu eklezio pritraktis la plej sangoverŝajn ĉapitrojn de ĝia historio. „Vi denove venas per tiuj sorĉistinoj” estis tre ofta slogano, per kiu anstataŭ de profunda bedaŭro kaj pentado, tiu ĉi temo estis pritraktita. Degnu tiuj ĉi sinjoroj per la sama slogano provi pritrakti ankaŭ la temon de holokaŭsto, ja ili ankaŭ koncerne la german-nazian persekutadon kaj murdadon de judoj ne estis sen sia kontribuo ĉe tiu ĉi ĝisĉiele etendiĝinta peko, por ke la tribunaloj de nia mondo eventuale malfermu iliajn okulojn pri la maniero, kiel ili parolas pri siaj iamaj viktimoj! Per la slogano: „Vi denove venas per tiuj judoj” nuntempe, danke al Dio, oni ne povas ŝerci, kiel oni daŭre povas cinike kaj senpune ŝerci pri la homoj, kiuj devis trapasi la plej kruelajn tortutmetodojn kaj fine morton sur la brulanta ŝtiparo, ĉar simple multaj tiutempaj klerikoj sian seksan obsedon kontentigis per sia terura sadismo, ja ili ne rajtis ĝin kontentigi per normala amorado en la lito. Se iu volas ekscii, kia estas la mensa kaj spirita parenceco aŭ rekte sameco inter la komunismo kaj katolikismo, sufiĉas iun katolikan sacerdoton aŭ laikan katolikan aktivulon demandi pri la krimoj de la katolika inkvizicio. Li ricevos klasikan marksisman respondon: „Oni devas konsideri la cirkonstancojn de la tiama tempo...” Ke tiel pensas marksisto, estas certgrade io komprenebla kaj eĉ pravigebla, ja unu el la diaĵoj en la komunisma religio kaj eklezio estas ĝuste la TEMPO, ja tiu Tempo el la morta materio evoluigis la vivon kaj finfine la homon. Sed se la saman argumentadon uzas la „kristano”, do la katoliko, tio signifas ke li negas la validon de ambaŭ testamentoj de la Dia vorto, ja ili ambaŭ estiĝis en certa tempo kaj do povas validi nur en tiu tempo, en kiu ili

estiĝis, kaj por ĝi. Kiomfoje mi en mia profesia ĉirkaŭo de miaj gekolegoj, kiuj studis la katolikan teologion, aŭskultis precize la samajn klarigojn pri la signifo de la Biblio: Oni devas konsideri la temon de ĝia estiĝo... Dek ordonoj de Dio (2Mz 20-) do en la katolika katekismo, kiu la originan formuladon el la Biblio ĉiukaze falsifas kaj mallongigas, devus teksti iel tiel: 1. Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi – *krom la nuntempe adorataj*... 2. Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin – *krom se temas pri ekipi katolikan aŭ ortodoksan eklezion aŭ propran domon per sohoj kaj bildoj*... 3. Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio – *krom se temas pri politika propagando aŭ ekleziaj traktaĵoj*; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon. 4. Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. Dum ses tagoj laboru kaj faru cxuijn viajn aferojn – *krom se temas pri akcelo de onia nacia ekonomio*; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio... 5. Respektu vian patron kaj vian patrino – *se ili ĝustatempe elmanigas sian monon kaj havaĵon al siaj infanoj kaj heredantoj*, por ke – *la kuracistoj plilongigu vian vivon sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi*. 6. Ne mortigu – *se vi ne estas al tio iel ajn devigata, ja tio en diversaj epokoj estas alia afero*... 7. Ne adultu – *en epokoj, dum kiuj tiu ĉi vorto estas ankoraŭ uzata*... 8. Ne sĝtelu – *en la tempo, kiam la loĝantoj ankoraŭ troviĝas en la domo aŭ la vendejo estas observata de la kameraoj*... 9. Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston – *krom se tiu povas pri tio informiĝi aŭ ia senatenta simpatianto de naziismo en iu eklezia gazeto publicas sian korektitan version de la historio pri germanaj ekstermaj kampoj*!... 10. Ne deziru la domon de via proksimulo – *se vi mem havas jam pli bonan propran*; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo – *krom se temas pri lia traktoro, aŭtomobilo, jakto!*...

Certe, mi baldaŭ pekus kontraŭ la 9-a ordono pri paroli kontraŭ la proksimulo, se mi al la romia eklezio submetus, ke ĝi laŭvorte, en tiu ĉi mia ironia formo de la „kompletigitaj” kaj karikaturitaj ordonoj disvastigas kaj instruas. Tion ĝi kompreneble ne faras – kvankam estus pli honeste tion fari – la karikaturita formo estus la sola konsekvenca uzo de la katolika-marksisma principo de la tempa relativismo.

Kian rilaton la romkatolika eklezio havas al honesto kaj „redono de perforte forprenita posedaĵo”, kio nuntempe estas tiom varmega temo de la sama eklezio ekzemple en Slovenio, kie la komunisma reĝimo fakte tiun institucion prirabis de granda parto de ĝia havaĵo kaj la hereda ŝtato ĝis nun ne komprenas la simplan juran logikon ke la forŝtelita aŭ rabita posedo devas esti al la damaĝita posedanto senkondiĉe redonita kaj ke oni ne praktiku ideologian „konstatadon pri la origino de la konfiskita havaĵo”, kiel la maldekstra parto de la politika sceno daŭre provas per ideologia pioĉo de la malgloro falinta „socialismo” kontraŭludi la postulojn de la jura ŝtato kaj prokrasti kaj ĝis sveniĝo kompliki redonadon de tio, kio estis perforte kaj neleĝe konfiskita, dum la maldekstraj politikaj partioj, dum ili regis, tre fervore kaj sen komplikado redonis la konfiskitan havaĵon de siaj adeptoj, kiuj pliparte estas posteuloj de la iamaj posedantoj, konfiskitaj antaŭ la jaro 1990-a. Koncerne tiun ĉi punkton la romkatolika eklezio en Slovenia, el jura vidpunkto, komplete pravas, ja ĝi por la ŝtato estas antaŭ ĉio egalrajta jura persono kun samaj rajtoj kiel ĉe aliaj juraj personoj. Sed ĝia interna problemaro, kiu la ŝtaton kaj antaŭ ĉio la ideajn heredantojn de la iama komunismo absolute ne tanĝas, estas la demando, ĉu el la kreda kaj spirita vidpunktoj estas konvene, tiom pledi pot tio, kion la iama povo perforte konfiskis. Tiu ĉi sama eklezio tamen en la tempo de la komunisma teroro pere de siaj reprezentantoj kelkfoje eĉ tre dankeme laŭdis la komunisman reĝimon, ke ĝi „savis ĝin de la zorgoj por teraj bonaĵoj kaj tiel liberigis ĝin por la aŭtenta religia agado sur la pastoralaj kaj sakramentaj kampoj”, kiel ĉiu povas legi en unuopaj numeroj de la eklezia gazeto *Družina* en Labako el la tempo komunisma. Tamen, kiamaniere komprenas kaj interpretas la sama eklezio la justecon kaj devon redoni la konfiskaĵon, kiam la



farinto de tiaj agoj estis tiu ĉi eklezio mem, mi antaŭ proksimume dek jaroj travivis en Klaŭdiforomo, kiam mi dum la preparlaboroj por la tradicia ekumena aranĝo – ĉiujara preĝaranĝo por la unueco de kristanoj – proponis, ke ni kunvenu antaŭ la ĉefpreĝejo de la urbo, kiun konstruis la tiamaj protestantoj kaj en la epoko de kontraŭreformacio ĝin konfiskis la karintia katolika diocezo kaj transdonis ĝin al jezuitoj kaj nuntempe ĝi estas la katedralo. Mi proponis, ke oni uzu la ekumenan okazon kaj petu pardonon ĉe la protestantoj pro la farita maljustaĵo, kaj la karintia episkopo proponu al ili solene la redonon de la preĝejo. Per tiu ĉi propono mi ne tratabiĝis eĉ ĝis la komitato, kiu tiun aranĝon organizas. Eĉ miaj plej proksimaj katolikaj amikoj el la tuta maljusta koro min priridegis, kvazaŭ ili havus antaŭ si la medicine konfirmitan frenezulon. Tio ĉi do estas la vera „redonado de la konfiskita havaĵo” laŭ la katolika kompreno! Se do la romkatolika eklezio vere strebus al korektado de historiaj maljustaĵoj, ĝi povus tiu-ĉi kampe multon fari kaj montri, sed pri tio neniu volas paroli, ja tiuj maljustaĵoj onidire okazis „profunde en la historio”. Tio signifas ke oni ankaŭ al farizeoj, Herodo kaj Pilato ĉesu riproĉi ĉion, kion ili faris kontraŭ nia Sinjoro, ja de tiam pasis multe pli da tempo ol ek de la persekutado kaj prirabado de protestantaj kristanoj kaj ilia eklezio. Kian opinion pri la Sankta Spirito povas akiri serĉanta persono en la kredo, se la katolikaj apologiistoj trankvile rakontas, kiel ilia eklezio estas ankaŭ peka, sed principe kondukata de la Sankta Spirito, kiam tiu serĉanto staras antaŭ la preta fakto, ke laŭ tio la Sankta Spirito estis, kiu kondukis sian „sole veran” eklezion persekuti alikredantojn kaj aliajn ekleziojn, malami judojn, virinojn, verajn diserĉantojn, religie asisti ĉe la konkerado de la ĝis tiam nekonataj kontinentoj kaj regionoj en Afriko kaj Azio, ne nur ĉe la konkerado, sed ankaŭ ĉe la masakrado de la enhejma loĝantaro – kaj finfine al la krimoj kontraŭ la reformitaj kristanoj kaj konfiskado de ilia havo, inkluzive de religiaj konstruaĵoj kaj institucioj... Aljuĝi la respondecon por tiom sangoverŝa kaj perforta historio, kun kia ĝi devos paŝi antaŭ Dion je la fino de la tempoj, la rom-katolika eklezio, al la tria Dia persono, signifas ĝuste tion, kion Jesuo proklamis la peko, kiu estos pardonita nek en tiu ĉi nek en la alia mondo, la peko kontraŭ la Sankta Spirito (Mt 12, 31; 32)! Sed tio ĉi estas ankaŭ la momento, kiam mi devas akzue je mi mem konfesi ankaŭ mian pekon, mian partoprenon en la sama afero. Se estis al mi desupre donite kompreni la malbonon, kiun en la tempo de kontraŭreformacio faris la romkatolika eklezio kaj ĝis nun ne pretas tion en kompleta dimensio kaj spirito agnoski kaj la faritan maljustaĵon rekompenci, do mi havis devon en mia postulo insisti kaj ne toleri ke oni min simple ridindigu kaj forpelu jam post mia unua provo. Mi tre bedaŭras ke mi tion ne faris kaj nur en mi mem kaŝis fortan disravigon pri la institucio, pri kies aŭtentikeco mi tiam ankoraŭ estis plene konvinkita.

La apologiistoj de la rom-katolika eklezio kvazaŭ ekvilibre al la historie konstatitaj krimoj, kiujn dum tiom longa tempo kaj en tiel demoneca violento kaj perverseco ĝi praktikis aŭ ĉe aliaj aprobis – ni pripensu nur pri la krimoj de la kroata ustaŝa faŝismo en la tempo de la 2-a mondmilito kaj samtiel pri la prikaŝado kaj apologiado de tio, kion praktikis la kroataj regularaj aŭ privataj milicoj en la tempo post la sendependiĝo de Kroatio kaj en la provo distranĉi Bosnion kaj Hercegovinon – emas surlistigi meritojn de la katolika sacerdotaro kaj de la eklezia hierarkio je nacia kaj tutmonda niveloj por estiĝo kaj kresko de la en si mem bonaj institucioj en scienco, arto kaj lerneja sistemo. Speciale en Slovenio oni povas ofte legi longan liston da ĉio ebla, pri kio meritas la slovena katolika sacerdoto kiel pioniro: la unua slovena gimnazio, la komenco de la slovena universitato, elpenso de fotografado sur vitra plato, unua tutaŭstria lernolibro pri abelbredado, iniciato por fondi la komunan sudslavan ŝtaton de Slovenoj, Kroatoj kaj Serboj (ne miksi kun la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, kiun per milita okupacio starigis la antaŭa Reĝlando Serbio, post 1929 nomata Reĝlando Jugoslavio), aŭtoreco de la unua slovena romano, komenco de slovena teatro, aŭtoreco de la unua (kaj ĝis nun sola) monografio pri socialismo, fondo de la viena knaba koruso „Wiener Sengerknaben” fare de la tiam viena ĉefepiskopo Slatkonja, devene sloveno, aĉeto de la pinto de la monto Triglav por slovena alpsocieto kaj tiel por tutslovena nacia uzo,

fondo de la unua slovena eldonejo kaj samtempe la dua plej malnova tutaŭstria eldonejo Mohorjeva en Klaŭdiforomo, iniciato por fondi slovenan akademion de sciencoj kaj artoj, lanĉo de „deklaro en majo” en la jaro 1843 pri ŝtata sendependeco de slovenoj en la tiama aŭstra monarkio ... kaj tiel plu senfine. Ĉio-ĉi povas esti rigardata tre bona kaj utila. Tamen: ĉu vere estas konvene kaj eble laŭdi katolikan sacerdoton ke li fondis strukturojn, konstruis, gvodis, negocis, verkis, komponis, pentris, instruis, regis, komercis, militis, do faris kutimajn aferojn de tiu ĉi mondo, kiu tamen ne estas la mondo, la reĝlando de Jesuo Kristo, sed de lia kontraŭanto Satano? Ĉu ne estas la sola afero, kiun oni povas atendi de la kristana sacerdote – kaj en vere kristana kredo sacerdotoj estas ĉiuj, kiuj akceptas la kredon en Jesuon Kriston kiel nian nuran peranton ĉe Dio kaj savanton kaj estontan reĝon de la renovigita mondo ke li predikas la Dian regnon kaj instruas al la homoj, kiamaniere tiun ĉi savon akiri kaj konsoli ilin per la Dia vorto kaj konduki ilin tra la plagoj de la tempo? Ĉu povas validi kiel modela kaj laŭdinda la sacerdote, kiu eventuale estas bona verkisto, sed koste je sia baza agado; bona teknika inventisto, sed tiel ke li lasas siajn ŝafojn sen paŝtisto; fama sociala aktivulo, sed tiel ke li lasas prediki al la kontraŭantoj de Jesuo; entreprenema fondinto de lernejoj, sed je kosto, ke liaj parokanoj ne ricevas instruon pri la bazo de la kristana kredo... La civilizaciaj kaj kulturaj sukcesoj estas la sukcesoj de ĉio homeca en ili, sed malvenkoj de ĉio dieca, por kiu ili sin devigis respondecaj. Estas bone akceli la evoluon de fotografada tekniko de la nivelo dagerotipia, kie oni ne povas fari kopiojn, al la nivelo pera kaj kopiebla, sur la ŝmirita vitra plato – sed kiom pli inda estus memori homojn je ilia diosimileco, ke la homo estis kreita kiel bildo de viva Dio, kaj neniue el la homoj estas kopio, kiel en la fotografada tekniko, sed originalo! Tio, kion la apologiistoj de Romo prenas por pruvo de la povo kaj beniteco de ilia eklezio, estas fakte granda fiasko koncerne de la taskigo eldirita de Jesuo: „*Tial vi iru kaj disĉipligu ĉiujn naciojn*” (Mt 28, 19). Eĉ se oni ne havus hospitalojn kaj universitatojn – kiuj ĉiuokaze baldaŭ fariĝis fortresoj de ateismo, komence de Sorbono en Parizo – muzeojn kaj sciencajn institutojn, socialajn solvojn kaj nacian literaturon, bonan rikolton de abela mielo aŭ ideon de poŝtmarko – sed oni havus homojn, instruitajn en la kredo, se oni do unuarange zorgu pri la Dia regno, tiel multaj aferoj estus aldonita, eĉ pli ol cetere (Mt 6, 33). Tion ĉi oni ne bezonas refuti per karikaturo de miaj atendoj,. Klare, ĉiu, eĉ se tiu sin prenas por „konsekrita” sacerdote, havas sian rajton je distriĝo kaj je aldona okupiĝo, kiu lin distras kaj redonas al li fortojn por la centra profesio por Dio, pri tio ne ekzistas dubo. Ankaŭ la sacerdote rajtas verki poezion kaj romanojn, rajtas reĝisori teatraĵojn, havas rajton ion inventi, nur ke ĉio ĉi restu en la rilato al tio, por kio li finfine estis vokita kaj sendita. Tamen neniue havas rajton „konstati” sukcesecon de iu eklezio per surlistigo de sacerdotaj hobiaj, eĉ speciale, se ili laŭ la investita tempo kaj fervoro forte superis la bazan sacerdotan laboron, ankaŭ se la rezultoj de tiaj flankaj okupiĝoj forte superis iliajn sacerdotajn rezultojn, tiam eĉ speciale ne! La sukcesmezuro de la eklezio kaj aparte eĉ de la aŭtenta eklezio de Jesuo Kristo, povas iel tiel esti konstatata nur laŭ unu afero: al kiomaj homoj ĝi malfermis la vojon al Kristo kaj pere de Kristo al la savo! Sub tia mezuro la rom-katolika eklezio estas antaŭ ĉio humanisma, politika, ekonomia, dum longaj jarcentoj kompreneble ankaŭ polica kaj militista, scienca kaj kultura institucio, sed ne la senditaro de nia Savanto.

La rom-katolika eklezio emas uzi la tradician komparon kaj sin mem nomas „ŝipo de la savo”, kio havas duoblan signifon: ke temas pri la navigado en la tempo kaj ekster tiu ĉi ŝipo ne ekzistas saviĝo: „*Salus extra ecclesiam non est*” (Cyprianus, Leteroj 73, 21,2). La dogmo pri la ekskluziva saviĝeco de la rom-katolika eklezio estis akceptita dum la 4-a laterana koncilio en la jaro 1215, en la jaro 1441 per sia bulao *Cantate Domino* firmigis ĝin la papo Eŭgeno IV.; la II-a vatikana koncilio samtempe ĝin konfirmis kaj relativigis konsiderante tiujn, kiuj la evangelion ne konas, per la deklaro *Lumen Gentium* 14, 16. La papo Johano Paŭlo II. en sia encikliko *Dominus Iesus* (6-an de aŭg. 2000) tamen denove emfazis la validecon de la sintagmo *Exter Ecclesiam nulla salus*: la rom-katolika eklezio laŭ li estas „la sola eklezio de Kristo”: „Ekzistas do unu nura eklezio de Kristo, reprezentata en la katolika eklezio”. La

franca filozofa J. J. Rousseau kontraŭstaris tian ekskluzivan kaj al militoj kondukantan starpunkton per la vortoj: „Tiu, kiu aŭdacas diri ‚ekster la eklezio ne estas saviĝo‘ endas esti elpelata el la ŝtato.” (Jean-Jacques Rousseau, *Du Contrat Social*, libro 4, ĉap. 8).

Kompreneble mi ne gratas ideon, iun ajn elpeli el la ŝtato, tamen Rousseau pravas en sia prijuĝo, kaŝita en lia kruda ukazo ke tiaspeca aserto – kaj en la Biblio oni ne trovas por ĝi bazon – efektive stimulas homojn al perforto kaj militado. Ke la saviĝo eĉ kiam eblas eĉ ekster la vera eklezio de Kristo, por ne paroli ekster tiuj eklezioj, kiuj nur sin prenas por akordiĝintaj kun Kristo, inter kiuj tiel ankaŭ la rom-katolika, atestas la saviĝo de la dekstra rabisto sur la kruco. La saviĝo venas ekskluzive el la Dia graco pere de Kristo, kiu deaĉetis nin antaŭ sia Patro de la peko kaj de la morto kaj tiel estas savita per Li ĉiu, kiu vokas Lian nomon (Jh 3, 16; Rom 5, 1; Ef 2, 8...). Verdire, la rom-katolika eklezio sin mem prenas por impona ŝipego de la savo. La komparon oni eĉ ne povas pririproĉi, ke ĝi ne havus rilaton kun la realeco. Fakte temas pri super ĉio impona ŝipego: „songoŝipo Enterprise”... Ĉi tie oni povas trovi ĉion, kion sopiras la homa koro, kaj ĉiun, kiu volas al homoj ion rakonti. Ek de la brila dancsalonego – kial do miri, se bona parto de nia konferenco en marto 2006 estis vere, laŭvorte vere dediĉita al la plano pri „Hausball”, interna balo de la Katolika agado – ĝis esotera butikoj; ekde la roma episkopo en lia ornato, kiu jam unuavide memorigas pri Jesuo, kia li marŝis tra Palestino... Kaj jen ankaŭ Dalajlamao, kiu sin mem prenas por dio sur la tero, sen ke pro tio li malpli interesiĝus pri la rolo de la ĉi-monda regnestro de Tibeto en estonteco; ĉi tie troviĝas ne nur la tri magoj el la kristnaska rakonto, ĉi tie oni renkontas tri cent aŭ ankaŭ tricent mil magojn el la tuta mondo, certe ne bibliajn, kiuj serĉis la bebon Dian, sed paganajn, kiuj antaŭ ĉio serĉas sin mem kaj sian magian povon kaj validon. Sed: ĉu tian ŝipegon oni povas surakvigi en la lago de Genezareto, kie ni povus renkonti nin kun Jesuo? Pri tio oni povas tre pravigite dubi. Nome: Jesuo atendas nin en malgranda fiŝkaptista boato sen ajna komforto, kia kutimas ĉe transoceanaj ŝipegoj, kia ankaŭ la rom-katolika estas. Kun la Savanto Jesuo ni povas renkontiĝi nur en la malgranda boato de la fido, kia estas ĉiu eta libera eklezia komunumo, kiu komplete sin bazas je Dia vorto, sed ne je historio de sia ĉi-monda eminenteco kaj komforteco (tradicio). En la rom-katolika eklezio oni povas ekkoni la metaforan ŝipegon TITANIC, ja ĝi en sia spirito estas la fenomeno de antikvaj grekaj diaĵoj, la infano de Kronoso kaj Geao, kiuj post la lukto inter la olimpikaj dioj, iĝis malsovaĝigitaj kaj fermitaj en Tartaro. La mondo estas narkotigita per la eminentecoj de tiu ĉi giganta ŝipo, kiu finfine tamen devos droni, kaj senzorge ĝin surpaŝas, priridante la senhelpan fiŝkaptistan boaton, en kiu nin atendas la vera Savanto...

Kelkaj miaj amikoj, kiuj daŭre insistas resti sur Titaniko de la fido, do en la rom-katolika imperiestra eklezio, riproĉas al mi, ke mi rifuzas ĉian organizan formon de la eklezio, rifuzas homajn strukturojn, sen kiuj tamen nenio funkcias kaj kondukas sur la kampo de la fido tiel, kiel sur la kampo de la politiko kondukas anarkiisto. Tio jen estas tre malbone pripensita kaj malmultekosta riproĉo, ja ĝi pendolas inter du ekstretoj, kvazaŭ inter ili nenio troviĝas: inter la imago de la konstantineca luksego kaj eminenteco, sub kiu la pura aparteno signifas pli ol fido kaj sincero – kaj inter la plena, preskaŭ aŭtisma individualismo, sub kiu la homo por sia savo bezonus neniun alian kaj eĉ aparte ne iun ajn organizitan religian komunecon, kiun oni povus ankaŭ nomi eklezio. Se do oni ne pledas por provoke luksa, komplika kaj ekstereca imperiestra eklezio de Romo, tiuj riproĉantoj opinias, tiam oni estas kondamnita je izolita individualismo, kiu havas kun la kristana kredo nenion komunan, ja la kristanismo estas la fido de la vokita komunumo. Estas, kvazaŭ oni dirus: se vi ne manĝegas tiel kiel manĝegis la eminentuloj en la antikva mondo, ke ili intertempe iris vomu por fari lokon por novaj nutraĵoj, do vi rifuzas la manĝadon kaj vi mortas pro la manko de nutraj substancoj... Bedaŭrinde tiel ne pensas nur la supraĵaj apologetoj de la imperiestra eklezio, sed ankaŭ tro multnombraj neinteligentaj patrinoj de nia epoko, kiuj opinias, ke iliaj infanoj mortas pro la malsato, se ili seninterrompe ne instigos ilin manĝi kaj ili antaŭmetas al ili pli longan manĝoliston ol oni ĝin trovas en bonaj restoracioj. En vero, tiel mi respondas al miaj riproĉantoj, oni povas racie kaj

modere manĝi. Tio ne estas ĉiam tiel facile – kiu scias tion pli bone ol mi mem – tamen tio estas io ebla! Kaj analogie, oni povas ankaŭ havi „moderan kaj racie gvidatan” eklezion, kian imagis ĝia fondinto Jesuo Kristo. Jesuo ne volis fondi gigantan reprezentecan ŝipon, kia estas tiu de Romo, kaj samteme li ankaŭ ne volis ĵeti akven naĝantan arbotrunkon, je kiu al kroĉiĝu la pekuloj favore al sia saviĝo. Li volis havi modestan fiŝkaptistan boaton kiel la plej konvenan mezuron kaj imagon de sia aŭtenta eklezio!

Dum longa tempo mi provis false, kontraŭ la spirito de Kristo, defendi la rom-katolikan eklezion, kiun mi tiam ankoraŭ plenumplekse prenis por sia, antaŭ la atakoj pro ĝiaj ne nur kontraŭhomecaj, sed eĉ pli kontraŭdiaj agoj, decidoj kaj doktrinecaj turniĝoj en ĝia milkvincentjara historio. Mi defendis ĝin, same kiel ĝi mem sin daŭre defendas: per senĉesa metado de la akuzmaterialo en la relativecon de la tempo, kio faras unu el plej malbonaj inferecaj ideoj de la homa menso, kiu inspiriĝas el la povo kaj aŭtoritato, kiu ne estas homdevena. Mi mem foje estis surprizita, kiamaniere oni povas per lerta advokata solvo, per bona pledoĵeo kovri eĉ tiom sangan kaj putran ĉapitron de certa institucio, kiun oni defendas. Iutage, sen ke mi jam pensus pri la forlaso de la institucio kun tioma ŝarĝo sur si, mi decidis, ke mi tion ne plu faros. Mi decidis transpreni mian respondecon por la institucio, al kiu mi apartenis. Kiam iu ajn riproĉis al mi la krimojn de Romo eĉ kontraŭ la propraj fidofratoj, ekzemple dum la prirabado kaj detruado de Konstantinoplo en la jaro 1202 sub la preteksto „liberigo de la tombo de Jesuo” aŭ okaze de krima pakto inter la papo, Francio kaj Osmana imperio kontraŭ la Habsburga Aŭstrio en la jaro 1544 (rigardu: Steven Runciman: *Die Eroberung von Konstantinopel*), mi simple respondis: „Jes, mi transprenas mian parton de respondeco por ĉio, kion la eklezio, al kiu mi apartenas, faris malican kaj kriman. Mi estas ankaŭ preta akcepti konsideran punon...” La rezulto ne estis nur la retiriĝo de tiuj, kiuj tiam al ankoraŭ tute „mia” institucio riproĉis la plej kruelajn krimojn, kiuj entute okazis en la homa historio, ja mian agnoskon kaj transprenon de la respondeco neniu povis kaj volis ekzekuti. La rezulto, kiun mi mem ne atendis kaj ne planis, estis, ke mi fariĝis almenaŭ iom pli preta honeste pagi mian parton de tiu respondeco, kio en klara teksto signifas: disponigi al la akuzintoj sian kapon. Tiel ankaŭ nuntempe, kiam la procedo jam pasis, mi asertas, ke la transpreno de plena respondeco estas la plej bona testo por la aŭtentikeco de iu ajn aparteno. Post certa tempo la transpreno de la respondeco por la krimagoj kaj misklarigoj de la rom-katolika eklezio kondukis min al pli profunda pripenso: Ĉu mi vere troviĝas en ĝusta „klubo”? Ĉu la institucio, por kiu mi tiel facilanime transprenas tiomajn garantiojn, tian pretecon de mi tute meritas kaj indas? Ĉu tiajn aferojn, pri kiuj atestas la historio, eĉ se mi deprenas ĉiujn troigojn, elpensajojn aŭ tute falsajn interpretadojn, sed tamen, oni povas daŭre kovri per guma argumento de mia amiko, ke „ankaŭ la Eklezion de Kristo ne konsistigas legioj de la anĝeloj”, precipe, post kiam mi vidis, kiel ridinde tiatipa apologio funkcias, se mi en la lokon de la „eklezio” enmetus ĉu nazian ĉu faŝistan ĉu komunistan partion? Ĉu ne estas multe pli saĝe demandi la Bibliion, ĉu ĝi donas al mi ian palpeblan kaj sufiĉe klaran kriterion, per kiu mi povus institucion, kiu ĵuras je Dio, per certeco enketi, ĉu ĝi tiamaniere parolas la veron aŭ ĉu ĝi mensogas kaj ĝia origino fakte estas en la regiono de demonoj. Jesuo la homon ankaŭ tiu-ĉi-rilate ne lasas sen sia respondo. Tiel li diras: „*Per iliaj fruktoj vi ekkonos ilin. Ĉu oni kolektas vinberarojn el dornarbetoj aŭ figojn el kardoj?*” (Mt 7, 16). Unuflanke estas vere ke ankaŭ la Eklezio, kiu fakte apartenas al Kristo, ne estas sen homaj malfortaĵoj kaj pekaĵoj. Sub tiu ĉi kovrilo sin kaŝas la rom-katolika defalo. Ankaŭ kvekeroj estas pekemaj homoj, tamen ne krimuloj. Ne estas konate ke ili iam ajn militus, sange persekutis alimaniere kredantajn homojn, ke ili praktikus kruelaĵojn laŭ la maniero de la katolika inkvizicio kaj simile. Jes, ili estas pekuloj, se ne ekzistus la deaĉetaĵo de Jesuo Kristo, ankaŭ ili estus kondamnitaj je morto – sed ili ne estas notoraj krimuloj, kiuj sian krimecon eĉ tiel lerte prikaŝus. Sed se oni al la roma eklezio permesas tiel elegante kaj malmultekoste eskapi, tiam oni devas la saman metodon uzi ankaŭ ĉe ĉiuj aliaj homaj socioj, ek de la Hitlera SS aŭ Stalina KGB: ili do ne estas anĝeloj, ili estas nure pekemaj homoj... La Biblio, Jesuo nia

Sinjoro mem, kiu tra ĝi alparolas la homojn, donas certecan kriterion, laŭ kiu oni povas tute klare prijuĝi, ĉu ni eventuale sidas en iu ĝisdente armita ŝipego de marrabistoj, kiuj sur sia standardo anstataŭ la mortsimbola kranio, kio korespondus kun la vero, havas la krucon de nia Sinjoro, kio faras puran blasfemon – ĉu ni sidas en la vera fiŝkaptista boato de Kristo sur la lago de Genezaret! La fruktoj de la institucio, por kiu mi tiel senpripense eldiris mian garantion, estas tiom signifoplenaj ke ĉi tie oni ne bezonas ian precize fajnan historian traserĉadon en arkivoj.

Bone. Se la aferoj estas tiel klaraj kaj tiel simple klarigeblaj, kial do mi bezonis tiom da tempo por ĉion-ĉi vidi en ĝia tuto kaj sistemo? Kiel povis okazi, ke ĝuste mi, ne malplibone informita pri la aferoj de la fido kaj eklezio, ja mi ankaŭ la Sanktan skribon ne trovis kaj komencis legi nur ekde hieraŭ, tamen bezonis preskaŭ unu tutan homan vivon ĝis en mi finfine heliĝis (miaj katolikaj amikoj kompreneble kun gajeco diros „malheliĝis”; sed la malhelo sur la tero estas en la ĉielo ega reflektoro – kaj reflektoroj de la tero estas en la ĉielo nigraj truoj...), kio pri tiu ĉi eklezio?

Unue: la homo estas laŭ sia falinta naturo ankaŭ estaĵo de komforto kaj oportuneco. Kaj al tiu ĉi *species*, prezentu mi min eĉ tiel brava kaj principa, en la tuta dimensio apartenas ankaŭ mi. Inter la pekoj, kiujn mi agnoskas al mia Sinjoro kaj pri kiuj mi Lin petis ilin al mi pardoni, estas ankaŭ pigreca alstrebo al laŭeble granda oportuno kaj la senprincipa postsekvo de la oportuneco. Oni ne emas fari al si tro grandajn malfacilaĵojn. Jen kaj jen oni akceptas eĉ iun konflikton, aparte, se la rezulto estas jam anticipe konata kaj garantiata, sed oni ne malfermas tro multajn batalfrontojn. Kial do pli ol ĝis la ankoraŭ eltenebla mezuro bori en la historion de la firmao, en kiu kaj por kiu oni povas labori, havante tamen en ĝi garantiitan kompare bonan societeton, laboron, kiun oni ŝatas aŭ oni ĝin almenaŭ kontente faras, eblecojn por plia lernado kaj por kontaktoj, kion oni nur malofte ricevas en aliaj kadroj? Oni procedas, kiel procedis tiom da miaj novaj kuncivitanoj, kiuj bone sciis pri ĉiuj kruelaĵoj de la nazia sistemo, sed je la fino de la milito ili pri nenio sciis. Bone, ni diru, ke la nazioj „iomete troigis”. Aŭ kiel procedis tiomaj miaj antaŭaj kuncivitanoj, kiuj sciis pri la kruelaĵoj de la komunismo, sed post la reĝimŝanĝo en la jaro 1990 ili samtiel nenion plu sciis, eventuale nur ke la komunistoj, ĝis ili regis, „iomete troigis”... Tiel ankaŭ mi troviĝis inter tiuj, kiuj envere sciis pli multe ol ili estis pretaj agnoski al si mem kaj al la aliaj; en plej bona kazo mi estis al mia institucio kritikema, sed neniam principe malakceptema. Sed esti kritikema, eĉ se tre akre, tio ĉiam signifas jam la akcepton de la bazaj antaŭpostuloj de tio, kion la kritiko alcelas. En miaj lastaj du jaroj, ek de kiam en mi komencis en siaj fundamentoj ŝanceli la konstruelementoj de la konstruaĵo, en kiu kaj por kiu mi ĝis nun laboris, mi fakte ne eksciis tiom da novaj aferoj kaj tiel ŝokajn, ke mi jam delonge ne povus eltiri la saman konkludon kiel nun: ke la fruktoj tute klare montras la veran naturon de la arbo – kaj ke tiu naturo ne venas desupre, sed desube, el la mondo de demonoj. Sub tiu ĉi aspekto mi ne kondukis kristane, en la spirito de Jesuo Kristo, sed „partie”, en la fispirito de lojala aparteno, kie la lojaleco ne alselas Dion, sed la falsifaĵon de Dia institucio, enkorpigita en la rom-katolika eklezio. La aparteno en la blinda lojaleco signifis por mi pli ol komparo kun la instruo de la Sinjoro mem, kio povus depreni mian socialan stabilecon kaj certecon.

Due: neni alia homa organizaĵo ol la rom-katolika eklezio ek de sia estiĝo – iel el la tempo de la imperiestro Teodozio fine de la 4-a jarcento – ghis niaj tagoj evoluigis kaj produktis en si tiomajn kaj tiel efikajn manualojn de la verdire orgena priservado de ĉiuj homaj psikaj kaj spirita bezonoj, kiel ĝuste tiu ĉi, de kiu mi nun adiaŭas. Ĉiu homa organo, ĉiu psika kaj spirita bezonoj, la tuta homa konstitucio ricevas en tiu ĉi eklezio sian konvenan respondon, kompenson kaj pnemumiĝon. Ĉi tie ĉio estas prizorgata – nu, ne vere ĉio, la vera saviĝo ekzemple ne, sed preskaŭ ĉio alia – ĉi tie la homo ne estas ekspoziciita eĉ al sia konscienco nek al sia konscio, li estas dum tuta tempo ĉirkaŭita de la galerio de la plej simpla popola kaj de la plej alta klasika pentra, skulpta kaj arkitektura arto; la homo estas lulata en artan ĝuon kaj psikan fervoron de la sonoj el plej eminentaj muzikiloj, komponistoj kaj realigantoj; li

estas narkotita kaj levita de la bonodoroj de la liturgia incendio; ĝis antaŭ kelkaj jardekoj tiu homo estis levita de la lingvo, de li nekomprenebla kaj pro tio eĉ pli majesta, sen rememori, ke oni ĝuste en tiu ĉi lingvo, kiu dum longa tempo apud la antikva hebrea kaj greka validis kiel „sankta” kaj en tiu „sankteco” kiel ekskluziva, la romiaj oficiroj elkriis brusajn komandojn por skurĝi Jesuon kaj finfine por lin krucumi, baldaŭ post la ĉieleniro de nia Sinjoro por la martirado kaj murdado de la kristanoj, kiuj la vorton „katolika” ne jam konis, kvankam ili baldaŭ ricevis romian episkopon, do superrevizoran estron, tamen ne „papon”, ja ili legis: „*Kaj nomu neniun sur la tero via patro, ĉar unu, kiu estas en la ĉielo, estas via Patro*” (Mt 23, 9). La homo estas en la roma imperia kaj katolika eklezio kiel kristalo en vato, kiel babo en inkubatoro. Li ne bezonas tie plenkreski en plenaĝon de sia fido kaj persona rilato al nia Sinjoro Jesuo Kristo, kio faras la esencon de la kristana kredo kaj vivo – tie li plenkreski preskaŭ ne povas. Ĉion esencan faras por li lia eklezio, kiu sin prenas por la „peranto de la savo kaj graco”, kvankam la evangelio instruas ke tiu ĉi perado estas rezervita al unu sola, Jesuo Kristo mem. Sed ĝuste tiamaniere ke ĝi alproprigas la saman rolon kaj signifon al si mem kiel ankaŭ al Mariaio, la patrino de Jesuo, kiun dum la nicea koncilio en la jaro 431 oni proklamis „Dipatrino” – *theotokos* – kaj atribuis al ŝi ĝuste la saman rolon, nome laŭ la Biblio nur al Jesuo Kristo rezervita perado, tiu ĉi eklezio pere sin karakterizas esti ne plu la eklezio de Kristo, sed de Mariaio. Se mi diras de Mariaio, mi kompreneble ne pensas pri Mariaio el Nazaret, edzino de la ĉarpentisto Jozefo kaj patrino de la homo Jesuo, sed je en Efezo konstruita koncepto de „Dipatrino”, kvazaŭ Dio povus havi patrinojn kaj tiel la dua persono de Dio havus sian komencon, kiel ĉiu nur-homo ĝin havas. La patrino de Dio, kiel ajn tio estas nelogika kaj blafema, ŝi mem, se ŝti tio vere povus esti, ne povas do ne esti ankaŭ mem diino, tio klaras kiel elementa duobligado. Tiel la katolikismo estas almenaŭ dudia sistemo, kio signifas, ke ĝi sin starigas en esence pli grandan distancon de la revelaciitaj veroj de la Biblio ol ni diru la islamo, kiu tamen severe insistas ĉe sia unudia kredosistemo. Tamen tiu ĉi dudia sistemo de Romo ne estas simetria, ja al la „diino” Mariaio estas adresitaj esence pli multaj atentigoj kaj adoroj ol al Patrodio. Oni tion povas enketi per vere librotena precizo ĉe la tre ŝatata „preĝo” de rozario, kie oni eldiras je dek anĝeluloj al Mariaio nu nuran Patronian. Tiel la katolikismo efektive estas de la kistana kredo defalinta idolana sekto kun du dioj, kun la vira dieco „Patrodio” kaj virina dieco „Ĉiela patrino Mariaio” kaj kun aro da duondioj, nomataj „sanktuloj”, sed atribuitaj per ecoj kaj fortoj, kiuj povas esti atributoj nur de veda Dio: ke ili elaŭdi la homon kaj por li peri ĉe Dio – denove sub la ignoro de la biblia vero, ke Jesuo Kristo estas la sola peranto inter Dio kaj homo: „*Ĉar estas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo*” (1Tim 2, 5). La rom-katolika eklezio tiel laŭ sia esenco estas la eklezio de Mariaio, sed ne de la vera Mariaio el Nazaret, kiu naskis la homon Jesuon, sed de la falsifita kaj per diaj atributoj konstruita Mariaio, efektive Artemidao de Efezo kaj jam antaŭ tio de Semiramis el Babilono: ambaŭ jam tiam prezentitaj kun bebo en siaj brakoj, ambaŭ prezentitaj kiel „reĝino de la ĉielo”. Kaj ĝuste tio ĉi donas al la homon, kion lia vundita animo tiel bezonas: la senton, ke li ne estas disponigita nur al la severa kaj senfine justa Dio-Patro, sed ke liaflanke, kiel tio funkcias en homaj familioj, staras ankaŭ la patrino-porpetantino, kiu per sia interveno ĉe Dio povas suspendi la justecon kaj validigas sian bonstatigan peradon por tiuj, kiuj serĉas ĉe ŝi konsolon. Nenio, nome, tiel bone esprimas la falintan kaj konfuzitan naturon de la homo ol la plurdia sistemo de la katolike koncipita pseŭdokristaneco.

Trie. Ek de mia dekkvinjara aĝo mi troviĝis sub la forta influo de la vivo kaj pensado de d-ro Ludoviko Zamenhof, iniciatinto kaj aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto. Kontraŭ lia lingvo, kiu baldaŭ fariĝis mia iamaniere dirite „patra lingvo” en kompletigo de mia patrina lingvo slovena, mi ankaŭ nuntempe ne havas rimarkon. Sed tiu ĉi nobla homo ne restis nur ĉe la lingvo, sed li sian genian lingvoverkon kompletigis ankaŭ per apartaj rigardoj sur la homon, homaron, pri (inter)naciaj kaj (inter)religiaj demandoj. Rigardate de la katolika pozicio oni lin povus preni por pioniro de la nuntempa religia ekumenismo. Tiel li kreis propran religian

koncepton, per kiu li intencis forigi konfliktojn inter la unuopaj religioj kaj eklezioj en analogio al sia internacia lingvo, ke ĉiu apud la religio, en kiu oni estis edukita restu adepto de sia origina kredo resp. eklezia komunumo, sed dum la renkontiĝo kaj kontakto inter la adeptoj de diversaj religiaj komunumoj ĉiu manifestu sian „hilelismen”, kiel li unue nomis sian sistemon laŭ la juda rabeno, samtempulo de Jesuo, Hilelo – resp. „homaranismen”, kiel li decidis nomi sian sistemon pli poste, kiam li komencis timi, ke lia religia sistemo povus esti ne sufiĉe neŭtrala kaj restis tro juda – li mem apartenis al la juda gento, en religia senco al liberala alo de sia komunumo, en sia matura vivoparto adepto de ĝenerala fido je ia „Forto mistera” „kiujn kelkaj nomas Dio”, kiu sian volon engravuris en la koron de ĉiu unuopa homo (kongrue kun Jer 31; Heb 10!), kaj la esenco de tiu volo estas en ĉiuj grandaj religioj la Ora regulo: „Kion vi volas, ke oni ne faru al vi, ankaŭ vi ne faru al aliaj” – en negativa formo, en kiu parolas la etiko kaj paganaj religioj, kion oni trovas ĉe Jesuo en evangelioj en pozitiva formo (Mt 7, 12; Lk 6, 31). Tiu ĉi instruo ŝajnis al mi tuj dekomence tre logika kaj la plej bona bazo por la paco inter la religioj, kio por Hans Küng estas la bazo por iu ajn paco en la mondo. La paco kaj la laboro por la paco estis por mi la centra ne nur etika, sed ankaŭ religia valoro kaj zorgo. Kaj ĝuste en tiu ĉi Zamenhofa koncepto mi en la tuta tempo vidis la plej bonan bazon por atingi pacon kaj forigi la militojn kaj interhomajn perfortaĵojn. Mi estis vera disĉiplo de tiu genia homo, kiu donis al la homaro unue tiel efikan kaj simplan, al la instruon kaj neinstruon alireblan internacian interkomprenigilon, antaŭ kiu la diferencoj en la povo kaj renomo de unuaj gentaj lingvoj malaperas kaj ekregas la lingva justeco – kaj poste li, anonime, sen sia aŭtografon, timante ke li tiamniere endanĝerigos sian lingvon, aldonis sian sistemon de ekumena toleremo kaj kunvivado, kiu, se la homaro tion akceptus, unufoje por ĉiam finus ĉiujn religie motivitajn militojn kaj perfortaĵojn. Tion ĉi mi vidis en nenia malkongruo kun mia katolika kredo, kiun mi mem tiel arde al mi alproprigis. Ankaŭ en tiu konfeso mi admiris ĝuste la spiriton de ekumenismo kaj toleremo por aliaj religiaj kredoj kaj eklezioj. Tiu-ĉi loke mi volas peti pardonon ĉe mia tiama pera estro d-ro Colerus Geldern, tiam spirita asistanto de la dioceza buroo por katolikaj intelektuloj. Antaŭ jaroj, dum ni preparis preĝsemajnon por unueco de kristanoj, kie mi iam fervore kunlaboris, ni interkverelis en telefona disputo, ja li havis pri tiu aranĝo kaj ankaŭ ĝenerale pri la ekumenismo tre singardan kaj skeptikan starpunkton. Nia telefondisputo daŭris preskaŭ unu horon – kaj nun mi volas ĉe estimata sinjoro en alta aĝo peti pardonon pro mia vigle polemika insistado ĉe la ideo kaj formo de tiaj aranĝoj, ja mi tre volonte agnoskas ke tiam li plene pravis kaj mi plene eraris! Ĉu el li, kvankam katolika sacerdoto kaj katolike pensanta filozofa de enviinda horizonto kaj profundo, tiam parolis la veron de la Dia vorto aŭ li en la afero simple postsekvis la antaŭkoncilian katolikan pensmanieron, mi ne povas diveni, sed estas la fakto ke liaj argumentoj estis ĝustaj, kiel miaj estis en la ardo de falsa konvinko eraraj kaj kontraŭbibliaj. Ho, kiel mi deziras ke ankaŭ li baldaŭ persone renkontus Jesuon Kriston kaj akceptus lian veran kaj puran instruon kaj tiamaniere la certecon de sia savo, kio faras la plej grandan akiron de la vivanta homo sur la tero! – Nun mi ne volas forlasi kaj forgesi la internacian lingvon de d-ro Zamenhof, kiu donacis al mi tiom da mirindaj homoj kaj malfermis al mi la buntan kaj riĉan de ĝia kultura medio, akompane de mia tuta nuna skeptiko pri la kulturo, sed tamen ne kontraŭ ĝi, se ĝi mem havas sufiĉe da kulturo kaj tiel komprenas sin humila servistino en la plano de la Sinjoro. Tiu ĉi lingvo konservis kaj transpontis en mi la intereson pri la Dia vorto en la dekjara periodo de mia junaĝa ateismo, ke mi spite al ĝi malfermis la Biblion en esperanta traduko de Zamenhof mem. Li ne eraris per sia lingvo, ja li volis helpe de ĝi plifaciligi la ŝarĝojn al la homoj, eĉ speciale al tiuj pli simplaj kaj malriĉaj kaj forigi la maljustaĵojn, kiuj estiĝas en kontaktoj inter diversaj lingvoj de grandaj kaj malgrandaj nacioj. Tamen mi adiaŭas entute de forta kredinstrua eraro, sub kiu mi dum tioma tempo kaŭris kaj ĝin en tia intenso praktikis el mia plej bona intenco kaj deziro, kontribui mian etan parton al la paco sur la tero; sed iu eraro pro tio ke ĝi naskiĝis el la plej bona intenco ne estas jam pli malgranda! En la Biblio sin montras ne ia „Forto mistera”, kiel Zamenhof nomas sian dion en

la „Preĝo sub la verda standardo”, kiun li legis dum la unua universala kongreso jare 1905, do antaŭ 100 jaroj, en la franca urbo Boulogne-sur-Mer. La Sankta skribo estas la vorto de la viva Dio de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo, raportanta pri la dua Dia persono, kiu kiel ankaŭ homo per sia ofero deaĉetos kaj savos la homaron – kaj tiuj estos savitaj, kiuj vokos lian nomon, la nomon de Jesuo, kaj en lin kredos.

Sed montru mi la kialojn de mia foriro ĝis senfine, unu afero restas senduba: mi ne foriras pro la „eraroj”, kiel klerikoj kutime, same kiel iliaj reciprokuloj je la komunisma flanko per tiu ĉi eŭfemismo nomas siajn malnoblaĵojn, ne pro skandaloj ne pro nekredebla psika kaj spirita, ĉiukaze ankaŭ intelekta kaj kultura senprizorgeco de granda pardo de klerikoj, eĉ malpli pro eventualaj konfliktoj kun ili; ili estis pliparte al mi afablaj kaj bonintencaj, mi nur ne rajtis tro menci la Dian vorton, la Biblion. Mi ne foriras pro ĉiam pli multaj raportoj kaj malkovroj pri homoseksualaj agoj, kaŝitaj sacerdotaj amoraĵoj kun virinoj, pro aferoj en malpermesitaj kontaktoj kun ministrantoj, pro pedofilio; kvankam ĉio-ĉi estas abomena, mi ankaŭ pro tio ne foriras. Ĉu mi baze estas iu pli bona? Neniel, pli verŝajne malpli bona. Se mi ne pekis laŭ la maniero A, kiu eĉ en nia tiel korupta socio validas por io abomena, mi tamen pekis laŭ la maniero B, kiu inter la blindaj samtempoj eĉ povas rikolti iom da reputacio, kvankam de la abomena maniero ne distingiĝas. La peko de la karno estas la peko de la karno, ĉiaspeca komparpesado estus tre duba afero, eĉ speciale, se ĝi devus helpi plibeligi min mem. Do mi diru rekte, estos plej honeste: mi ne foriras, ĉar mi vidis ke la konfidaj personoj en la eklezio estas same pekofaraj kiel mi mem. Mi ankaŭ ne foriras ĉar la societo de tiuj homoj post tio, kiam mi adiaŭis la pekojn kaj agnoskis ilin antaŭ mia Dio, subite fariĝus neeltenebla. Ĝuste kontraŭe, la konvertiĝo levas en la homo komprenemon por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konvertiĝis. La konvertiĝinta malpli kondamnas kaj en la plej bona okazo tute plu ne kondamnas. Mi do ne foriras pro la skandaliĝo, kvankam ĝuste tio min unue sendis kompari inter la Skribo kaj la instruoj de la eklezio. Mi foriras, por atingi la kernon, pro tio kion mi en tiu ĉi komparado trovis. Tiu ĉi eklezio ne instruas la veran evangelion, sed disvastigas la homajn kaj demonajn instruojn, pri kiuj sin unue esprimis la Sinjoro mem, pensante pri la tiama sinagogo, sed same valide por hodiaŭ: „*Sed vane ili min adoras, instruante por instruo ordonojn de homoj*” (Mt 15, 9). Kaj apostolo Paŭlo diras el sia profeta spirito pri la tempo, en kiu ni nun vivas, ĵus nun: „*Sed la Spirito klare diras, ke en la postvenontaj tempoj kelkaj defalos de la fido, atentante delogantajn spiritojn kaj doktrinojn de demonoj, per la hipokriteco de trompantoj, kiuj havas konsciencan kaŭterizitan kvazaŭ per brule varmega fero...*” (1Tim 4, 1-2)

Kio konsistigas la plej karakterizajn „demoninstruojn”, pri kiuj mi ĉi tie pensas? Unualoke certe tiu, ke Jesuo per sia ofero ne komplete kaj ĝisfine plenumis la volon de sia Patro kaj lia absoluta justeco por povi ĝin akordigi kun lia senfina amo kaj el tio nin atingis kiel donaco, laŭ la graco kaj nenio alia, la savo. Tiu, kiu post ĉio-ĉi, kion revelaciis al ni la apostoloj, daŭre ripetas la „oferon” de la Sinjoro, kvazaŭ ĝi ne estus farita unufoje por ĉiam (Heb 7, 27), kiel substrekas la apostolo; se sciante, do laborante flanke de la demonoj, kiuj volas subfosi ĝuste tiun grandegan verkon de Jesuo Kristo. La diablo instrukas, ne la Spirito de Dio, ke la ofero de Kristo bezonas daŭrajn homajn ripetojn, aldonojn kaj servojn. Se tiu ne agas en scio, do pekante, ĉar li akceptis la unkcion de sacerdoteco sen scio kaj kompreno de la Skribo. De la sama demona origino estas ankaŭ la ripetado „Sinjoro, Sinjoro...”, kiel Jesuo mem menciis (Mt 7, 21), tamen savas nin la kredo, kompreneble pruvita per bonaj agoj, sed baze tamen sole la fido en tion ke Kristo estas la Sinjoro. Tiu, kiu asertas ke iu ajn eklezio estas savodona aŭ eĉ ke ekster ĝi ne troviĝas savo, diras malveron kaj kalumnias la Sinjoron, en kiu sole ni havas nian savon. Tio estas la provo forrabi la gracon, kiu troviĝas ĉe la Sinjoro kaj la eklezio volas ĝin alproprigi al si kaj tion en sia demoneca instruado daŭre faras.

Sed se la unua atako de Satano kontraŭ la vero de Kristo estas malagnosko de lia finplenumita saviga ofero kaj de sufiĉeco de la fido en lin por ricevi la savon, la dua atako, ne malpli granda, estas la provo aldoni aliajn „kunsavantojn” kaj „kunperantojn”, kvankam nur unu sola estas la Savanto kaj nur unu sola la Peranto (Mt 23, 10; 1Tim 2, 5), kiel ni legas en la Skribo.



Ĝuste tio ĉi, nome, estas la vera funkcio de la aldonaj kultoj, kiuj ne havas fundamenton en la evangelio: la kulto de Maria, la kulto de la „sanktuloj” kaj la kulto de la homo kiel „anstataŭanto de Kristo sur la tero”, kiun oni eĉ nomas blasfeme „la sankta patro”, kiel la Biblio nomas ekskluzive Patron Dion. Ke la rom-katolika eklezio baze estas dediĉita al Maria kaj ne al Jesuo, estas pli ol evidente. Kompreneble ne temas pri la vera Maria el Nazaret, la patrino de la homo Jesuo, sed pri la antikva orienta diino, kiu jam en sia komenca babilona kulto „naskis Dion”, kion oni atribuas al Maria ankaŭ en la katolika ŝajna kristaneco, tiel ke kontraŭ la tuta logiko virino, naskiĝinta en la tempo kaj mortinta en la tempo, naskis Dion, kiu vivas deeterne. Sed se Satano volas elpuŝi Kriston de la prioritato je la dekstra flanko de la Patro kaj fari por la „reĝino de la ĉieloj” iun homan estaĵon, tiam Satano riskas ankaŭ rompi la leĝon de la logika pensado kaj inspiras unue por la sama eklezio cetere problemecan teologian verkiston Origenon, kiu kiel la unua uzis la kunmetaĵon *theotokos* – Dipatrino – kaj poste la koruptitan imperian klerikaron por akcepti tiel absurdan dogmon. Kiel putrajn elkreskaĵojn stimulas tia kredo, atestas al mi ĉiutage la eldiroj de iom pli kleraj, sed bedaŭrinde ne ankaŭ pli karakteraj katolikoj, in ter ili troviĝas kelkaj sacerdotoj, ke ili en tiajn aferojn mem ne kredas, sed ke tio ne estas tiom esenca afero kaj estas oportune resti en tiu ĉi eklezio, ja ĝi „tamen ebligas fari tiom da bonaj agoj”... Ili mensogas al propra estraro kaj same al la popolo, instruante ĝin, kaj tion ili prenas por „tiom da bonaj agoj”! Iu amiko, unu el plej ĝenerale kleraj slovenoj, ankaŭ en religio, ĉarme fidis al mi ke mi ĝenerale pravus, sed ke li estas ligita al tiu ĉi eklezio pro ĝia mirinda liturgio, arto de eklezia arkitekturo kaj la tuta granda arttrezoro, ĉi tie akumulita... Ili produktas la kripon laŭ Francisko el Assisi, sed ili muntas ĝin en marmoraj katedraloj de la roma eminenteco... Kiu ne pretas agnoski ke la roma eklezio posedas mirindan liturgion kaj aron da aliaj mirindaĵoj. Sed ni ne gratu iluziojn: ĉiuj paganaj religioj havis kaj havas mirindan arkitekturan arton, mirindan muzikon kaj kantadon, mirindan pentro-kaj skulptoarton; kiel ni vidas ĉe grekoj tiel mirindan liturgion, neniu povis havi pli belan, ankaŭ Konstantinoplo kaj Romo en kristana epoko ne, ke el ĝi naskiĝis la plej alta drama arto, la antikva greka tragedio! Se miaj bonintencaj, sed tiel malĝuste pensantaj amikoj provas min reteni ĉe la garantiita pano kun ĉiuj eblaj renomaĵoj kaj eminentaĵoj de la roma eklezio, tamen miaj plej proksimaj homoj provas min persvadi per ne rekte eldirita morala riproĉo – ho moralismo, pli malproksime al Dio ol la malmoraleco mem! – kaj petante min konsilas: Restu ankoraŭ tiom longe ke vi akiros pension, poste vi faru laŭ via plaĉo... Ili ne demandas, ĉu mia kredo pravus aŭ ne, ankaŭ ne, ĉu la kredoinstruo de la eklezio, el kiu mi foriras, pravus aŭ ne, ili proponas al mi ke mi negocu kun mia Dio kaj eltenu plu en la institucio, kiun mi prenas por baze kontraŭdia, ĝis mi akiros la garantiitan panon. Mi ne rajtas ilin kondamni, ja el ili parolas la timo antaŭ la manko de nepraĵoj kaj verŝajne eĉ pli la timo antaŭ la nekonato kaj antaŭ la klaĉaĵoj kaj priridadoj de aliaj homoj, eĉ se ili estas evidentaj vivruinoj. La diablo havas sian ĝojon pro tiaspeca parolado. Tiuj ĉi miaj plej proksimaj homoj anstataŭ li deĵoras en la servo de tentado, sen ke ili pri tio konscius. Mia homa naturo emas agnoski ilian pravon, eĉ kiom! Verdire, kia problemo, se mi eltenus ankoraŭ kelkajn jarojn, poste mi estus tute libera, se mi jam devus, kaj mi tiam povus laŭte proklami mian kredon kaj eĉ eldirus kelkiun frazon de akra kritiko kontraŭ la eklezio, kies panon mi antaŭe manĝis. Mi mem tre verŝajne estus pteta fari tian malpuran kompromison, ja mi absolute ne estas pli bona ol ĉiuj, kiuj min provas persvade, ke mi parolu malveron, ke mi plu vivu en la malvero. Sed sur la trono de mia koro, kie antaŭe pompis kaj blagis la ŝvelita homa EGOO, nun sidas iu alia. Tiu ĉi loko nun estas rezervita por la memo de Jesuo Kristo, kiel tion tiel mirinde diras G. Steinberger en sia elstara broŝuro pri la konvertiĝo kiel Dia donaco al la homoj. Sed la memo de Kristo ne konas kompromisojn inter la homa kaj Dia sferoj. Li postulas de mi mian JES aŭ NE, ion mezan li ne konas. Ĉar mi la stirilon de mia vivo por ĉiam kaj en ĉiaj cirkonstancoj disponigis al li, mi devas al ĉiuj, kiuj min persvadas, ke mi raciigu, respondi, ke tio estus forta malsaĝo antaŭ Dio, kaj al ĉiuj, kiuj al mi riproĉas ke tio, kion mi faras, estas frenezo, mi devas respondi ke ĝuste la frenezo estas

la saĝo antaŭ Dio, kiel argumentas la apostolo (1Kor 1, 19-20; 2, 14; 3, 19). Ne estas mi mem tiu, kiu pro sia klara envido kaj firma karaktero ne cedus, Jesuo estas tiu en mi, kiu havas evidenton kaj karakteron. Mi ne povas kaj ne rajtas fanfaroni, ke mi insistas en tio, kio pravus; nur povas min gratuli per lia nomo, kiel rekomendas la apostolo (Rom 15, 17), ja ni per nenio alia rajtas nin gratuli, se ni restu sur la malvasta vojo de Kristo.

Mia foriro tamen ne estas nur foriro, sed ankaŭ alveno; ne estas nur perdo de io, kio min nutris kaj portis, sed eĉ pli la akiro de tio, kio min nutros kaj portos por la eterna mondo, kiel tio de antaŭe min nutris kaj portis por la portempa mondo. Ne temas nur pri la salutado en la adiaŭo, temas ankaŭ pri la invito por la nova renkontiĝo sub la kruco, kie sole la kristano povas serĉi sian societon. Ho, kiel bele estus, se vi ĉiuj, tion legante, elŝirus el sia brusto la egoon, kia por ĉiuj homoj, ne malpli al mi, probable eĉ pli, naskiĝis en la koro de niaj unuaj gepatroj de la antaŭkalendara kaj tuj poste de la perdita paradizo, por fiksi ĝin sur la krucon, sur kiu pendas nia Savo. Se mi trinkis kun vi la vinon sur la tero, kie ĉio estas por ni ankaŭ en funkcio de veneno, kiel volonte mi trinkus kun vi tion, kion en la eterna savo enverŝos al ni Jesuo mem kaj tio servos nur plu al nia beateco kaj apoteozo! Kaj por tion atingi vi ne bezonas fari ion alian ol demeti vian malnovan homon, la fiskintan firmaon de la homa mempravigeco, mempardoneco kaj memsaviĝo, kiel ilin predikas la mondo kaj kun la mondo ĉiuj religioj kaj ĉiuj imperiestraj eklezioj, ankaŭ tiu-ĉi, el kiu mi foriras. Nur tri paŝojn oni devas fari; neniun kandelon oni bezonas aĉeti kaj bruligi, neniun pilgrimadon entrepreni, neniajn ritojn kaj sakramentajn agojn oni devas postuli: nur rompi la bastonon de la kondamno super si mem, disponigi sian kompletan falitecon al Jesuo sur la kruco kaj sur tiun krucon fiksi ankaŭ sian egoon, kaj trie: kredi ke li estas Kristo, la Sinjoro, ke li ĝisfine suferis kaj unufoje por ĉiam mortis por ni por ke ni pere de li ricevu savon. Tio jen estas ĉio. Neniu „konsekrita” akvo, neniun fumo, neniun sacerdota titolo kaj honoro, neniun stranga vesto neniun imponega konstruaĵo, la Filo sufiĉas al ni, *Christus solus*, lia graco cufiĉas al ni, *gratia sola*, lia Vorto sufiĉas al ni, *scriptura sola*, kaj la fido en lin estas sufiĉe, kiun ni ricevis )2Pt 1, 1), la fido sola, *fides sola*!

Fine de mia klarigo kaj invito, por ke ni ĉiuj akceptu kaj vestu sur nin la novan homon (Ef 4, 24), kio fakte signifas „survesti Kriston” kaj tiel surpaŝas de la vasta stratego, kiu ne kondukas al la savo, sur la densan padon de la Sinjoro, kiu kondukas tien, mi petas ĉiujn, kiuj tion ĉi legos kaj mi vin iam konscie aŭ senkonscie trafis aŭ ĉagrenis aŭ faris al vi maljustaĵon aŭ estis kontraŭ vi malhonesta aŭ malĝentila, en la nomo de nia Sinjoro, kiu tiom gracoplene pardonas nin, ke ankaŭ vi min pardonu kaj ĝoju en la Dia promeso, ke ankaŭ Dio vin pardonos laŭ la mezuro de via pardono. Kompreneble ankaŭ mi jam delonge el mia memoro forviŝis ĉion, pri kio iu eventuale dezirus ke mi pardonu, dankante al la Sinjoro, ke li donacis al ni tiun ĉi ekkonon kaj povon, nin reciproke pardoni kaj komune ĝoji pro la Dia pardono.

En la tempo de la pritrakto de la pasiono de la Sinjoro – en la jaro 2006.

En la arda deziro kaj peto, ke ni estu unu en Li -